

Leterkesto
Claude Gacond, 296-a radioprelego, 1969.06.11 & 14

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Kiel promesite ni malfermas nian leterkeston. De multaj monatoj, karaj geaŭdantoj, ni ne plu babilis kun vi. Kaj tio estas iom bedaŭrinda.

A.- Ricevante viajn leterojn, ni rimarkas, ke komunaj ideoj kaj komunaj interesoj nin ligas. Dum la naŭ minutoj, kiujn ni disponas ĉiusemajne por esperanto, ni ĉiam volis pritrakti temojn, kiuj valoras la penon estis disaŭdigataj. Kaj ni rimarkas, ke ĝuste pro tio vi nin regule aŭskultas, ke vi eĉ registras niajn prelegojn, por poste ilin reaŭdigi en loka grupo. Tiel se nia aŭdantaro eble ne samnombras kiel la aŭdantaro de pli facilaj nacilingvaj elsendoj, almenaŭ ni scias, ke niaj paroloj tamen ne vane perdiĝas.

Cl.- Niaj elsendoj pri la traveturo de Mahatma Gandhi en Svislando vekis grandan intereson. Pri tiu temo skribis al ni sinjorino E. Kohler en Besançon, Francio kaj sinjoroj Franz Tischer en Magdeburg, Orienta Germanio, kiu estis jam aŭdanto de Edmond Privat. Aŭdu lin :

A.- « *Pri la mondfama sinjoro Gandhi mi jam multe aŭdis de la bedaŭrata esperanto-pioniro profesoro Edmond Privat, kiu mem akompanis sinjoron Gandhi ne nur tra Svislando, sed eble ankaŭ tra aliaj landoj.* »

Cl.- Al tiu fidela aŭdanto de niaj elsendoj ni sendas hodiaŭ novan verkon de Edmond Privat, kiu rememorigos al li la radioprelegojn de nia antaŭulo. Temas pri la verko *Vivo de Gandhi*.

A.- Tiun libron, dank'al niaj disaŭdigoj pri Gandhi, aĉetis niaj fidelegaj geaŭdantoj Najbaro en Keighley, Britio. En unu el siaj afablaj poŝtkartoj ili informiĝas, ĉu eblas prunti sonbendon. Ofte venas tiaj demandoj. Bedaŭrinde ni ne povas respondi al tiaj petoj. Unue la radio-registradoj ne estas kompareblaj kun la registradoj faritaj helpe de amatoraj registritoj. Ĉio estas diferenca : la turnrapido, la larĝo de la bendoj. Plie nia radio-elsendejo reuzas la bendojn. Do, tuj post disaŭdigo niaj prelegoj estas forviŝitaj. Radio estas io efemera, kiel ĉiuj konversacioj.

Cl.- Sinjoro Werner Gafke en Dresden, Orienta Germanio, skribas : « *Tre volonte mi postlegus la elsenditajn prelegojn pri Mahatma Gandhi. Permesu la demandon, ĉu ekzistas ebleco sendi al mi tiujn prelegojn kaj, post disaŭdigo, la estontajn ?* »

A.- Kiel por la sonbendoj, ni ne povas jese respondi al tiuj petoj. Sed ili nin kuraĝigas sendi tiujn tekstojn al esperanta revuo. Kiam ni trovos la tempon ni proponos tiujn prelegojn pri Gandhi al revuo, kaj tiam ni vin informos pri la rezultoj. Siatempe *Sennaciulo* aperigis niajn prelegojn pri 80 jaroj de esperanta vivo, kaj vi atendas nian prelegserion pri Volapük. Nur mankis al ni ĝis hodiaŭ la tempo transformi niajn dialogojn en gazet-artikoloj. Ho, se la tago havus duoble pli da horoj, ni povus jesi, karaj geaŭdantoj, al ĉiuj viaj petoj. Sed, fakte, tiel ne estas.

Cl.- Ĉiam pri tiu prelegaro ankoraŭ skribis sinjoro John Brownlee en Upminster, Britio, sinjorino Alice Peake en York, Britio, sinjoro Lucien Giloteaux en Croix, Francio kaj fine nia radio-kolegino en Budapeŝt, Hungario, sinjorino Eva Farkas, kun kiu ni konatiĝis en Keĉkemmet la pasintan someron. Aŭdu ŝin :

A.- « *Post longa paŭzo mi denove sukcesis aŭdi vian dissendon eĉ tute bone, preskaŭ senĝene ! De la unua frazo ĝis la lasta, klare kaj laŭte mi aŭdis la prelegon okaze de la jubileo de Mahatma Gandhi. Mi trovis tre interesa la tradukon el la tagĵurnalo de Romain Roland pri la vizito de Gandhi en Svislando ! Mi nepre klopodos aŭskulti ankaŭ la anoncitan daŭrigon en la venonta semajno !* »

Leterkesto

Claude Gacond, 296-a radioprelego, 1969.06.11 & 14

Cl.- Ni same provis aŭdi vin, kara kolegino, sed tute vane. Ni loĝas en sufiĉe profunda valo en la montaro Ĵuraso, kaj malgraŭ bonega anteno la kurtaj ondoj nin malfacile atingas. Ni aŭdis, ke Radio-Budapeŝt subite silentis, kaj ni tre esperas, ke tre baldaŭ esperanto reestos dissendata el la lando de niaj famaj verkistoj Baghy, Kalocsay kaj Szathmari.

A.- Geaŭdantoj skribis okaze de mia malsaniĝo. El London, Britio, ni ricevis la saluton : *« Aŭdinte hieraŭ, ke vi estas malsana, ni esperu, ke vi tre baldaŭ resaniĝos, ĉar via ĉarma voĉo estas ŝatata. Regula aŭskultanto. »* Do, ni kore salutas tiun regulan aŭskultanton. Ni nur bedaŭras, ke ni ne povis sendi al li salutkarton pere de nia radio, kiel ni faris por la ceteraj salutantoj. Sinjoro Henri Coulon en Besançon, Francio, reaŭdis kun plezuro mian voĉon.

Cl.- Sinjoro Walter Kaukal en Neustadt-Weinstrasse, Okcidenta Germanio, skribis pri la sama temo kaj nin informas, ke niaj prelegoj pri la ski-semajno en Adelboden kaj pri la mondmapo de Tibor Sekelj vekis diskutojn en ilia esperantista rondo.

A.- Pri tiu temo : geografia nomenklature, skribis multaj geaŭdantoj, kaj ni konservas iliajn leterojn por la venonta semajno, ĉar tiu temo valoras iom da atento.

Cl.- El la Esperanto-Klubo Centre culturel communal en La Ricamarie, Francio, ni ricevis leteron kun la subskriboj de dekkvino da geaŭdantoj. Ili rakontas, ke ili sonbendigis nian elsendon pri la ski-ferio en Adelboden, kaj poste ĝin tradukis kaj ili ankaŭ deziris al mia edzino rapidan resaniĝon. Ni devas diri, ke malmultaj malsanuloj ricevas salutvortojn el tiel diversaj landoj. Grandan dankon al niaj amikoj Dony, Mohamed, Goby, Richaux, Pigeon, Pucéat kaj ceteraj, ne ĉiuj subskriboj estas facile legeblaj.

A.- Multaj aliaj salutoj restas en nia leterkesto. Paciencu unu semajnon por nova amika babilado. Eble ni ĉerpos vian mesaĝon.

Cl.- Vi aŭdis amikan babiladon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-